




1* 1991*142

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Delegitoj de la 6-a kongreso de ĈEA

Bondeziroj por la jaro 1991 :

Jiří Karen

Sursojle de la Nova jaro
mi sincere deziras al vi:
feliĉe finu ĉiun vian faron,
mondon ne regu fanatismo,
neniu Luther, Mohamed, Calvin,
niaj nacioj reale sin vidu
tra kristalklara prismo
de espero, amo kaj humanismo.

Čestmír Vidman

Maminka hrávala na piáno
při němých filmech
Lezli jsme přes vrátka
po vzoru Zorro matitele
Obzor byl neemírný
pod starou jabloní
A jablka byla sladoučká
jako sluneční paprsky
i déšť byl teplý
a sníh hebounký
když učitel Matoušek
pět let trpělivě otvíral
makovičky klukovských pohledů
Kronikář našich nezbedností
Měřil fotografickými kroky
naši budoucnost

Pianlude akompanadis
la panjo mutajn filmojn
Ni transgrimpadis pordeton
pri Zorro-venĝanto revante
Nemezureblis horizonto
sub kruda pomarbo
Kaj pomoj dolĉe bongustis
samkiel suna radi'
Eĉ pluvo estis varma
neĝo ŝvelmola
Poste la instruisto Matoušek
kvin jarojn apertis pacience
papav-kapetojn de bubaj rigardoj
Kronikisto de niaj petolaĵoj
per fotografaĵ paŝoj mezuris
nian futuron.

Krajinou křehkých stvolů
kráciš k mrakům zim
Za drápky obzor
visí pod lunou
Zatknuté nažky
hlídají kořeny
Ať se neztrácejí v mlze
neskotačí nazmar
chrastrivé plody
lampionového podzimu.

Tra la pejzaĝ' de tigoj facilaj
vintro-nebulojn celas vi
Unget-kaptite horizonto
sub la luno pendas
Ŝrumpaj akenoj
radikojn gardas
Ne perdiĝu en nebul'
ne finiĝu pereige
kraketantaj fruktoj
de lampiona aŭtun' .

Alparolo de nia prezidanto okaze de la nova jaro 1991 :



Karaj legantoj,

Ĝuste nun vi rigardas la unuan numeron de STARTO 1991. Ĝi estas la unua ne nur el vidpunkto de la nova jaro 1991 kaj komenco de lasta jardeko de la 20-a jarcento, sed ankaŭ kaj precipe pro tio, ke ĝi malfermas novan epokon de nia agado. Kiel vi ekscios sur la sekva paĝo, ĈEA havas novan gvidan organon, 7-membran Konsilantaron. STARTO estas presita en nova presejo, kiu prome-

sis al ni ne nur pli bonan kvaliton, sed ankaŭ pli mallongan produkto-periodon. Rezulte de tio mi esperas, ke nia (ankaŭ nova) redaktoro povos provizi nin per vere fresaj kaj aktualaj sciigoj pri nia agado.

Konsilantaro devos batali kontraŭ grandaj, ĉefe ekonomiaj malfacilaĵoj (altiĝo de prezoj por preskaŭ ĉio neevitebla por nia agado), per kiuj ni devas pagi por nia nuntempa libereco. Mi esperas, ke ni ĉiuj preferas tiun ekonomian premon antaŭ la politika diktatoreco, kiun ni spertis en antaŭrevolucia epoko. Tamen, la nove ekestantaj problemojn ni ĉiuj komune devas elimini kaj male, profiti la novajn eblojn. Kaj mi esperas, ke vere ni ĉiuj, kaj funkciuloj en ĉiuj lokoj, kaj membroj de niaj sekcioj, komisionoj kaj kluboj, sukcesos komune privilegii nian movadon kaj baldaŭ kolekti fruktojn de nia agado.

El la plej gravaj aranĝoj, kiujn ni nun atendas, mi nomu la 43-an kongreson de IFEF okazontan en Olomouc 1991-05-11/17 kun ĝia antaŭkongreso en Prago (postkongreson aranĝos SEA en Žilina), kaj omaĝo al J.A.Komenský (Komenio) okaze de la 400-a datreveno de lia naskiĝo, kiun ni festos en la jaro 1992. En januaro, kiam mi skribas ĉi tiujn liniojn, mi ankoraŭ ne scias, ĉu ni havos eblon omaĝi la prapatron de la interlingvistiko per organizo de la Universala Kongreso de Esperanto. Se la estraro de UEA decidus kongresi en 1992 ne en Prago, ni tamen omaĝos Komenion per alia grava aranĝo, se eble per oficiala antaŭkongreso de la 77-a UK. Por la nova epoko mi deziras al vi, karaj legantoj, firman sanon, altan emon kaj multe da sukcesoj en via labora kaj poresperanta agado.

d-ro Ing. Petr Chrdle

La 6-a kongreso de ĈEA

La politikaj ŝanĝoj en nia lando ebligis ankaŭ al nia asocio aranĝi la 6-an kongreson post 3 jaroj (la 5-a okazis en septembro 1987 en Olomouc), ne post 5 jaroj, kiel trudiĝis al ni la totalisma reĝimo. La aranĝo estis komisiita al la esperantisto en Třebíč ekde la 30-a de novembro ĝis la 2-a de decembro 1990. En la palaco Forumo kolektiĝis c. 300 personoj, kvankam nur okdek delegitoj de la Esperanto-klubo, la ceteraj estis honoraj membroj de ĈEA, membroj de la Centra Komitato de ĈEA kaj gastoj.

La kongreson malfermis loka geknaba kanthoro, poste la unua vicprezidanto Ing. Vlastimil Kočvara prezentis la gastojn: anglan samideanon Richard Howard, reprezentantojn el Slovakio, s-anojn Eduard V. Tvarožek, d-ro Stanislav Košecký kaj Ing. Aleš Bednář kaj honorajn membrojn de ĈEA, ges-anojn Vuk Ehtner, Karel Franc, MUDr. Josef Hradil, Jaroslav Mařík, Pavel Sittauer kaj Josef Vondroušek. La kongreso poste akceptis tri novajn honorajn membrojn: Marie Bartovská el Frýdek-Místek pro ŝia scienc-teknika laboro, Alena Růžicková-Pavlinová, aktorino el Brno, pro ŝia kultura aktivado, kaj d-ro Vladimír Mohapl el Olomouc pro lia agado en la loka E-movado.

En sia enkonduka parolado la prezidanto, d-ro Ing. Petr Chrdle, pritraktis la agadon de ĈEA ekde la 5-a kongreso. Poste la sekretario Ing. Zdeněk Pluhař bildigis la malĝojigan financon situation de nia asocio. La luprezo por la ĉambroj de la sekretariejo altiĝis kvaroble, kreskis ankaŭ la kosto por la poligrafiaj laboroj de Starto; la membrokotizoj ne sufiĉas, tamen ne eblas altiĝi ilin, ĉar tio malkreskigus la membrobazon. En la sekretariejo estas stokitaj libroj en la valoro de 900 000 kronoj, sed neniu ilin aĉetas. La membronombro malkreskis de 3100 al 2600 membroj.

La kongreso akceptis novan Statuton de ĈEA. La plej gravaj ŝanĝoj estas: akcepto de membroj sen limigo de aĝo (infanoj) kaj nuligo de la Centra Komitato - restas nur 7-membra Konsilantaro, kiu estis balote elektita poste. El 11 proponitoj la delegitoj elektis 7 gesamideanojn, kiuj en la unua kunsido disdividis la funkciojn jene:

Prezidanto: d-ro Ing. Petr Chrdle

(respondecas pri eksteraj rilatoj, fervojistoj, INFOSERVO, komisiono por gazetaro kaj informado; li estas membro de la ĉeĥa-slovaka E-komitato),

Vicprezidanto: Pavel Polnický

(respondecas pri turismo kaj pri kristanoj katolikaj kaj nekatolikaj),

Vicprezidanto: Ing. Vladimír Dvořák

(respondecas pri la pedagogia, junulara kaj porinfana agadoj),

Sekretario: Ing. Zdeněk Pluhař

(respondecas pri la sekretariejo, pri la eldonado, pri la sekcioj scienc-teknika kaj medicina; li estas membro de la ĉeĥa-slovaka E-komitato),

Konsilanto: Věra Podhradská

(respondecas pri protokolado, pri laboraj-juraj aferoj, pri SET Landov),

Konsilanto: Vladimír Hasala

(respondecas pri sekcioj de kooperativoj, kolektantoj, naturprotektantoj kaj ŝakistoj),

Konsilanto: Ing. Vlastimil Kočvara

(respondecas pri sekcioj de veteranoj, invalidoj, nevidantoj, literaturistoj; li estas membro de la ĉeĥa-slovaka E-komitato).

Konsilanto: Ing. Vlastimil Kočvara

(respondecas pri sekcioj de veteranoj, invalidoj, nevidantoj, literaturistoj; li estas membro de la ĉeĥa-slovaka E-komitato).

Konsilantaro nomumis la Kontrolan kaj Revizian Komisionon, kies estro estas Lada Bala kaj membroj Ottilie Barešová kaj Jiří Fanta.

En diskutado la delegitoj plej ofte demandis pri la stato de preparoj de UK 1992.

En la kultura programo s-ano Miroslav Smyčka akompanata pianlude de s-ano Jiří Vychodil prezentis Esperantlingve kelkajn konatajn oper-ariojn kaj kantojn, s-anino Alena Růžicková-Pavlinová deklamis la faman poemon de Rudyard Kipling "Se". En unu el apudaj salonetoj inter mineralogiaj eksponaĵoj estis vendataj Esperantaj libroj (inter ili ankaŭ tute nova konversacio de Ing. Vladimír Němec, kiun eldonis la Slovacka Esperanto-Asocio).

Vendrede antaŭ la komenco de la kongreso okazis en Kilian-domo eksterordinaraj asociaj ekzamenoj.

Miroslav Malovec, 3.12.1990



Ing. Vladimír Dvořák




Pavel Polnický




Ing. Zdeněk Pluhař



Věra Podhradská



Ing. Vlastimil Kočvara



Vladimír Hasala

SLOVAKIA ESPERANTO-ASOCIO KONGRESIS EN POPRAD

La XI-an Kongreson de SEA, kiu okazis dum la tagoj 07.-09.12.1990, partoprenis pli ol cent delegitoj kaj aliaj membroj de la Asocio, kiuj ŝatis ĉeesti la taksadon de la agado dum pasintaj tri jaroj kaj same kontribui al formulado de novaj taskoj en la sekva, kiel oni ĝenerale antaŭsupozas, komplika periodo. La Kongreson ĉeestis krom reprezentantino de Ministerio de Kulturo en Slovakio, d-ino Farkašová, ankaŭ s-ro U. Princz, estrarano de UEA kaj sektretario de HEA, reprezentantoj de ĈEA - prezidanto P. Chrdle, Vl. Kočvara, Vl. Hasala kaj J. Skalická, poste reprezentantoj de IFEF kaj (ankoraŭa) GDREA s-ro A. Heintl kaj s-ino C. Trochold kaj J. Halász, reprezentanto de la fervojista fako de HEA kun edzino. Post alparoloj de oficialaj gastoj kaj elekto de laborkomisionoj sekvis la ĉefraporto, kiun prezentis la tiama sekretario de SEA Ing. Milan Zvara. En sia ampleksa parolado li tuŝis kaj la ĉefajn atingojn kaj problemojn kaj mankojn, poste li skizis la direktojn por ebla estonta laboro de la Asocio. Krom alia li koncerne la ekonomian situacion menciis, ke dum la jaro 1990 la elspezoj de SEA atingis kvin milionojn da kronoj. La ekonomia agado estas en venonta merkata sistemo "nura ebleco sen granda kapitalo transvivi tiun ĉi situacion". Li krome akcentis la rolon de la Esperanto-Centro de SEA, kiu kiel ekonomia establaĵo devas per sia agado prizorgi monon por la financado de ne nur propraj bezonoj, sed ankaŭ de tiuj de la tuta Asocio. Pri la membrobazo li konstatis, ke la nombro de membroj estas sub tri mil, kvankam oni supozis transiri al kvar mil membroj. Post la analizo de la faka agado, kie estis atingitaj bonaj rezultoj (en sekcioj fervojista, lingvistika, scienc-teknika, vegetarana), de la problema eldona agado (kie SEA sukcesis eldoni kelkajn valorajn eldonaĵojn) kaj de la multflanka afero de internaciaj rilatoj, kiu sukcese disvastiĝas kaj SEA fariĝas iom post iom grava centro de internaciaj renkontiĝoj (AIS, Mezeŭropa konferenco, Monda Turismo ktp.). Post vigla diskuto, estis aprobita la nova statuto de SEA, kiu estas esprimo de la klopodoj pri ĝia decentrigo, demokratiigo, plisimpligo, malplilongigo, liberigo de akraj kontrastoj. Oni ekz. ŝanĝis la metodon de aprobo de metodo de registrado, t.e. la Asocia Konsilantaro (kiu ekestis anstataŭ la ĝisnuna Centra Komitato) nur registras la novajn sekciojn, ekestis kategorio de regionaj organoj, kiuj ne bezonas egali al la administraj disdivido. Oni ne plu havas la t.n. subtenantajn membrojn, sed la membreco povas esti nur ordinara kaj honora. Al la ordinara membro apartenas kun kelkaj esceptoj ankaŭ la membroj ĝis 18 jaroj (membreco estas ebla praktike de la 0-a jaro). Ĉiu membro de la Asocio havas laŭ la nova statuto rajton partopreni ĉiun aranĝon organizatan de SEA (t.e. ankaŭ la kongreson). Pli vaste komprenata estas ankaŭ la kunlaboro de SEA kun aliaj E-asocioj kaj organizaĵoj. Sekvis elekto de la Asocia Konsilantaro kaj de la prezidanto de la Asocio. La prezidanto de la Asocio fariĝis s-ro Ing. Milan Zvara, la membroj de la Asocia Konsilantaro fariĝis jenaj 15 funkciuloj: J. Göldrich, M. Zvara, S. Košický, M. Šaturová, J. Vajš, E. Tvarožek, M. Peřičková, M. Neubeler, E. Erby, J. Gonžúr, Š. Špičák, A. Zachariáš, I. Slávik, A. Čambál, J. Reinhardt, anstataŭantoj estas E. Geleta, M. Ivan kaj P. Pavúk. La Revizia Komisiono konsistas el s-inoj Bednářiková, Lukáčová kaj Mlynárová.

Post fruktodona kaj riĉa diskuto (ĝia dua parto) venis la akcepto de ĉefaj taskoj por la jaroj 1991-1993, kiuj enhavas ses punktojn de baza signifo por la plibonigo, intensigo de la organiza laboro de SEA kaj stabiligo de la ekonomia agado. Unuj el la lastaj punktoj estis la decidoj de la XI-a Kongreso de SEA, kiuj krom la aprobo de la ĉefraporto, la ĉefaj taskoj kaj rezultoj de la balotado pri la prezidanto, Asocia Konsilantaro kaj Revizia Komisiono taskigas la Asocian Konsilantaron ellabori strategian planon de la agado de la Asocio por venontaj tri jaroj kaj Estraron prepari la disdividon de la ekonomia agado de la Esperanto-Centro disde la asocia agado. La venonta, XII-a Kongreso de SEA okazos en la jaro 1993 en Bratislava.

Stanislav Košický



EKSKURSO AL AŬSTRIO

La pilsena Esperanto-klubo aranĝis unutagan aŭtobusan ekskurson en Aŭstrio. Ĉe la landlimo atendis du aŭstriaĵ samideanoj, kiuj gvidis la partoprenantojn tra la urbo Linz. Tra alpa pejzaĝo ni poste atingis Salcburgon, kie du lokaj samideaninoj montris al ni la citadelon, katedralon, Mirabelparkon kaj de ekstere la Mozart-muzeon. La buso poste transportis nin en la sinon de la alpa montaro, al nekredeble bela vidaĵo - montara lago ĉirkaŭita de alpaĵ pintoj kun glaciaj kovriloj (la monto Dachstein 3004 m). La pilsena klubo okazigis ekskursojn ankaŭ al ZOO-ĝardeno en Dvůr Králové kaj al la kastelo Kuks, ne nur por esperantistoj, kaj renkontiĝojn en la urbeto Kašperské Hory en la Bohema Arbaro en Šumava.

Tuj post la fino de la XI-a Kongreso de SEA, la 9-an de decembro 1990, okazis la kunsido de Ĉeĥoslovakia Esperanto-komitato, kiun partoprenis flanke de ĈEA d-ro Petr Chrdle, Ing. Vl. Kočvara kaj Vl. Hasala, flanke de SEA Ing. M. Zvara, Ing. J. Vajs kaj d-ro Kořecký. Post informo de d-ro Chrdle pri la rezultoj de la 6-a Kongreso de ĈEA oni interkonsentis pri la metodo de interŝanĝo de eldonitaj libroj kaj aliaj aldonaĵoj (kun la reciproka rabato 10 %). Plue oni traktis pri la bezono de pli intensa kunlaboro de redaktoroj de ambaŭ asociaj organoj: Esperantisto Slovaka kaj Starto kun la celo atingi pli bonan reciproke informadon de la legantaro pri propraj aranĝoj, pri eblecoj de eldonado de soci-kultura revuo Perspektivo, pri eluzado de la servoj de Monda Turismo helpe de t.n. karuselaj ekskursoj. Oni interkonsentis ankaŭ pri la transnomo de la Komitato, kiu ekde la jaro 1991 fariĝas Kunordiga Komitato de ĈEA kaj SEA (KKĈS).

La plua kunsido de KKĈS okazos provizore en aprilo en Olomouc.

- atk

[illegible]

Ekde la 14-an de julio ĝis la 11-an de aŭgusto 1991 okazos en la hungara urbeto Kelidakustány tendaro kun Esperanto-instruado por intereseitoj de ĉiuj aĝoj. La urbeto situas inter la urbo Zalaegerszeg kaj la lago Balatono. Apud la tendaro troviĝas banejo kun varma akvo.

Unu dusemajna etapo
(Ĝis la 28-a de julio al-
ekde la 29-a de julio)
kostas ĉirkaŭ 4000 forintoj
aŭ 720 aŭstraj ŝilingoj.
Skribu al: Csinski Tibor,
Balatoni út. 36, 8900
Zalaegerszék, Hungarujo.

Jam la klasika Esperanto-
tendaro en Lanĉov, proponas
ĉiujare jenajn tri etapojn:

I.	30.6.1991 - 13.7.1991
II.	14.7.1991 - 27.7.1991
III.	28.7.1991 - 10.8.1991

Kvar instruhoroj ĉiutage
(kaj unu horo de kantado)
kursoj por komencantoj, por
progresintoj, konversacia
kurso kaj kursoj por
instruantoj kaj tradukontoj.
Banado, boatado, promenoj
ekskursoj, tendarfajroj.

Partoprenkotizo por unu
persono: 1300,- kronoj
(neplenaĝuloj kaj membroj de
ĈEA aŭ SEA ricevas rabaton).
Skribu al adreso: ESPERANTO,
674 01 Třebíč, Ĉeĥoslovakio.

Ekde la 7-a ĝis la 9-a de decembro 1990 okazis en Blansko konferenco de Junulara Sekcio de ĈEA. Verŝajne pro malfavora ekonomia situacio partoprenis ĉi-jare bedaŭrinde nur proksimume 30 gejunuloj.

Oficiala parto de la konferenco komenciĝis sabate. Prezidanto de la sekcio V. Dvořák prelegis pri sukcesoj kaj malsukcesoj dum la pasinta jaro kaj antaŭmetis planon de la agado por la jaro 1991. Sekretario K. Ryšánek prelegis pri la financa situacio. Partoprenintoj de la kongreso de ĈEA informis la ceterajn pri procedo kaj pri adaptado de regularo. La konferenco ratifikis membrajn kotizojn (25 kaj 40 kronoj), per kiuj oni financas la junularan gazeton Ĉirkulero, kaj ankaŭ adaptadon de la regularo de Junulara Sekcio. La estraro de JS laboros ĝis nova elektado en la venonta jaro en konsisto: prezidanto - Ing. Vladimír Dvořák, vicprezidanto - d-ino Pavla Dvořáková, sekretario - Karel Ryšánek, Ing. Jana Burianová, Vlasta Piščíková, Jana Charuzová kaj Vladimíra Chvátalová. Sabate posttagmeze kaj dimanĉe oni diskutis en tri laborgrupoj. Temoj de diskutado estis - JS kaj eksteraj rilatoj; financoj; agadoj de turistaj gvidantoj.

Krome ni kompreneble ankaŭ amuzis nin, kantis, meditadis, rigardis diaĉpozitivojn el Japanujo, Finnlando, Aŭstrio ktp. La konferenco plenumis sian celon, sed venontfoje ni dezirus bonvenigi pli multnombrian partoprenanton.

Vladimíra Chvátalová

okazos en la tagoj 1991-07-20/26 en Karlskoga en Svedio. La prezoj inter 1300 (propra tendo) kaj 2700 (dultita ĉambro) svedaj kronoj. Aligilojn petu ĉe la landaj junularaj Esperantaj organizoj aŭ ĉe la adreso: La 47-a IJK, Box 4278, S-10266 Stockholm, Svedio.

Komercajn anoncojn kaj reklamojn necesas pritrakti kun sekretariejo de ĈEA. Privatajn petojn pri korespondado kaj nekomercajn anoncojn ni publikigos senpage, sed sen garantio, laŭ libera loko en la gazeto. Skribu al adreso:

STARTO, box 425, CS - 660 25 BRNO 2

HONORAJ MEMBROJ DE ĈEA

Ekde la 1-a kongreso. Brno 1969

* Bárčová Anna * JUDr. Fousek Josef * prof. Kilian Theodor *
Kofínek Jiří * Lukáš Miloš * JUDr. Pumr Tomáš * Pytloun František
* Scheiber Vilibald * Šupichová Julie * Šustr Jaroslav *

Ekde la 3-a kongreso. Praha 1979

* Bartošík Adolf * Echtner Vuk * Mařík Jaroslav * Odehnal
Antonín * Seemanová Eva * Sittauer Pavel * Špár Václav * Vitek
Josef * Vondroušek Josef *

Ekde la 4-a kongreso. Pardubice 1982

* Franc Karel * MUDr. Hradil Josef * Urbanová Eli *

Ekde la 5-na kongreso. Olomouc 1987

* Dr. Herman Vladimír * JUDr. Kožík František * Staněk František *

Ekde la 6-a kongreso. Třebíč 1990

* Bartovská Marie * Dr. Mohapl Vladimír * Růžičková-Pavlinová
Alena *

Vivis kaj vivas homoj, kies koro ekflamis por la bela ideo de la homara bonfaranto Ludoviko Lazaro Zamenhof kaj kiuj dediĉis sian vivon, aŭ ĝian konsiderindan parton, al la realigado de tiu praktika idealo, la interkomprenilo de diverskontinentaj popoloj.

Tiaj homoj ne ĝuis kaj ne ĝuas materian kontentiĝon pro sia sindediĉo al la afero. Al ili devas sufiĉi eventuala danko aŭ eĉ rekono de aliaj adeptoj de la afero, de la internacia lingvo Esperanto.

Tia penso, evidente, sugestis al la asocia prezidanto la deziron memori al la esperantistaro la meritojn de tiaj homoj kaj omaĝeti al ili en la asocia organo STARTO per almenaŭ konciza supervido pri iliaj vivo kaj faroj.

Hodiaŭ prezentas Jaroslav Mařík jenajn:

Julie Šupichová (1884 - 1970)

Ŝi naskiĝis en Studnice apud Náchod la 27-an de januaro 1884. Profesie instruistino (en Červený Kostelec, Hronov, Praha). Esperantistino de 1907, fondintino de Esperanta Unuiĝo en Č. Kostelec, de Rondeto de Esperantistinoj (Praha), kies honor. membrino ŝi fariĝis, de Libera Unuiĝo de Esperanto-Amikaro (ĝis la nazia okupacio). Membrino de la supera institucio Lingva Komitato, de la komitato de Bohema Asocio Esperantista, kaj de la ekzamena komisiono de Esperanto-Asocio de ĈSR, sekretario de la XIII-a Universala Kongreso en Praha, delegitino kaj prelegantino ĉe Internacia Konferenco Instruista en Genevo 1922 (aranĝis Instituto J.J. Rousseau), prezidantino de virina kunveno ĉe la XV-a UK en Nurenbergo, membrino de la Kuratoraro de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno, delegitino de UEA. Ŝi fariĝis honora membrino de UEA ekde 1933, Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, de Esperantista Societo "Komenský" en Ostrava-Zábřeh kaj de la menciita Esperanto-Amikaro. Ŝtate ekzamenita pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj.

Al vasta publiko ŝi fariĝis konata per sia okjara kurso kaj kroniko de Esperanto en la revuo Malý Ĉtenář (Vilímek, Praha). Eĉ nun troviĝas homoj, kiuj memoras tiun kurson; sed neniu scias, ke ŝi dum ok jaroj devis labori pro tiu memvola tasko kaj korektado de kursan-lecionoj ofte ĝis la 2-a horo matena, sen iu ajn rekompenco, kio difektis ŝian sanon kaj devigis al tro frua emeritiĝo profesia. Post la unua mondmilito ŝi diskoniĝis pro sia revuo Esperateký zpravodaj.

Ŝi estas aŭtorino de 23 librotitoloj, precipe lernolibroj kaj aliaj helpiloj, el kiuj Lernolibro de Esperanto aperis kvinfoje (ministerie aprobita por lernejoj), po unu eldono en la kroata lingvo (Zagreb), kaj pola (Varsovio) kaj en la blindula skribo. Ankaŭ ŝia Juna korespondanto aperis en Pollando. Gravan rolon en la informado de la ĉeĥa publiko havis ŝiaj libroj "Esperanto, jeha vývoj a význam pro národní školu" (Ĉs. graf. unie, 1935) kaj "Kdo je Zamenhof" (Orbis, 1947). J. Šupichová pionire kaj senlace kunlaboris kun 60 gazetoj sur la kampo de edukado, klerigo kaj propagando de Esperanto, gvidis dum jaroj en Národní politika rubrikon "Z esperantského světa" gvidis kursojn en gazetoj kaj revuoj, ankaŭ sep prelego-ciklojn en la Radio.

Prave skribis Novobilský: "Per tiel vaste bazita propaganda laboro ŝi grave influis la estontan evoluon de Esperanto en Ĉeĥoslovakio. Fakte ĝis nun ne sufiĉe konsiderata." Julie Šupichová estas fenomeno de entuziasma, ekzemplodona, formika laborado por la ideo de Esperanto. Ŝi sekvis la devizon "Ni fosu nian sulkon". La morto trafis ŝin en Praha, la 20-an de decembro 1970.

Anna Bárčová (1894 - 1975)

Internacie konata ankaŭ sub la nomo Anĉi Nývltová, ŝi naskiĝis la 23-an de majo 1894 en Příbyslav. 43 jarojn ŝi estis bankoficistino en Praha, esperantistino kaj membrino de Esperantista Klubo en Praha de j. 1922, komitatano de la EK (1927 - 1975) kaj EACSR, en tiu lasta ankaŭ librotenistino; diligenta kluba kasiistino dum 32 jaroj.

Anĉi gvidis kursojn de Esperanto por nevidantoj kaj funkciis kiel gvidanto de nevidantaj esperantistoj ĉe iuj Universalaj Kongresoj, el kiuj ŝi sep partoprenis, plurfoje en nia nacia kostumo. Ŝi havis tri centojn da korespondantoj, notitajn en aparta protokol-libro. Ŝi ofereme helpadis en la kontoro de la estinta EACSR. Dum multaj jaroj ŝi ekspedadis la kluban bultenon, kiu sub la redakto de Vitek (50 numeroj en la jaroj 1953 - 1958) atingis internacian resonon (W. Auld, J. Régulo Pérez k.a.). Estante grava ligilo dum la tempo sen asocia gazeto, ŝi estis dissendata de Bárčová en la tutan landon kaj eĉ pliparte en la tutan mondon. La plej alta kvanto de unu numero atingis 1800 ekzeplerojn (!) - peniga, sed multsignifa laboro. Ŝi sinofere zorgadis pri vojaĝantaj esperantistoj, kiuj komencis nomi ŝin "nia panjo", kiu krome ĉiam havigis ankaŭ tranoktadon. Ŝia loĝejo en la Sokolovská-strato fariĝis vivoplena pertelefona informejo por Praha - kaj ne nur por ŝi. Forpasis ŝi postlasis ankaŭ ses dikajn memorlibrojn kun fotoj kaj enskriboj eĉ de famaj esperantistoj, ekz. de Privat, Baghy, Čech, Benczik, Kamaryt, Lukáš, Bokarev, Itco, Kola Ajayi, Uspienski, Hans Jakob, Holmes ktp.

Distingoj al Anĉi Bárčová: Honora diplomo de ĈSEK, jubilea honora insigno de MEM. Kaj granda dankemo de granda esperantista familio ... Anna Bárčová forpasis la 23-an de aprilo 1975.

Distingoj al Anĉi Bárčová: Honora diplomo de ĈSEK, jubilea honora insigno de MEM. Kaj granda dankemo de granda esperantista familio ... Anna Bárčová forpasis la 23-an de aprilo 1975.

Theodor Kilian (1894 - 1978)

T. Kilian naskiĝis 1894-09-26 en Ivančice kaj estis profesoro de komerca akademio kaj direktoro de sanitara lernejo. Fariĝis esperantisto en la j. 1919 en la siberia Tomsk kaj en la militkaptitejo konatiĝis kun samsortano Julio Baghy. Reveninte li dediĉis poste dum sesdek jaroj sian liberan tempon al disvastigo de Esperanto kaj al ĝia movado. De 1920 li estis delegito de UEA, fondis Esperanto-klubojn en Ivančice kaj Třebíč, estis membro de la komitato de EAĈSR kaj de ĝia lerneja kaj ekzamena komisiono, prezidanto kaj poste honora membro de la Esperantista Klubo en Brno, klubestro en Třebíč ekde ĝia fondo, membro de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kaj prezidanto de ĝia lingva komisiono, idea gvidanto de la komitato por aranĝado de Someraj Esperanto-Tendaroj (de 1958 en Lančov, 1952 - 57 en aliaj lokoj).

Kilian fariĝis unu el la plej popularaj aktivuloj de la ĉeĥoslovaka movado kaj renoma aŭtoro. Li gvidis pli ol 40 kursojn de Esperanto, laboris dum jaroj en la Esperanto-elsendoj de la radiostacio Brno (prelego-serioj pri ĈSR) kaj poste en ĝiaj artprogramoj "Verda stacio", kiun li kunkreis de la 1-a "Esperanto-horeto" elsendita en 1934 ĝis la fatala jaro 1938. Li tradukis por la Radio la verkon Blanka malsano de Karel Čapek avertanta kontraŭ la minacanta faŝismo, verkis monografion pri Zamenhof "Esperanto a jeho tvůrce". Li multe kontribuis al gazetoj kaj famiĝis precipe per sia lernolibro de Esperanto, kiu estis eldonita en la suma kvanto (ĝis 1969) 100 mil ekzempleroj, kaj "Cvičebnice esperanta" en kelkaj eldonoj. Popularaj estas ankaŭ liaj verkoj "La mondo rakontas", 50 originalaj rakontoj, kaj "808 nejuživánějších slovnických kmenů". En la subskriba kampanjo de UEA al UNO favore al Esperanto, post la dua milito, li sukcesis kolekti 1.007.731 subskribojn kolektivajn kaj individuajn, inter ili de posta prezidento Zápotočský, de kvar ministroj, ĉefepiskopo, 26 parlamentanoj - per tio ĈSR atingis la trian lokon en monda skalo post Germanujo kaj Japanujo.

Theodor Kilian mortis en Třebíč la 3-an de julio 1978. Li starigis al si idean monumenton per sia tutviva agado kaj materian monumenton per testamenta donaco de sia domo al la loka klubo en Třebíč.

(daŭrigo)

Kio okazas en niaj kluboj?

Lanškroun: por la jaro 1991 ni akiris du novajn ĈEA-anojn; en la Urba Biblioteko en Lanškroun ni instalas 6-panelan ekspozicion pri Esperanto, pruntitan el Česká Třebová (en la tagoj 14.-30.11.1990 trarigardis la ekspozicieton 300 vizitantoj); 20.11.1990 s-ino Jana Křížová rakontis pri sia vizito ĉe esperantistoj en Finnlando, la rakontadon ŝi ilustris per diapozitivoj.

Kolín: 10.11.1990 mortis subite samideano Václav Tůma, 56-jara fervojisto, kiu uzis Esperanton ĉe siaj eksterlandaj vojaĝoj. Li invitis al nia klubo geedzan paron el Nov-Zelando (June Doig, 64 Murphy Road, Taradale, Hawkes Bay, Nov-Zelando). Domaĝe, ke post lia morto similaj vizitoj ne plu okazos.

Haviřov: prezidanto Zdeněk Heiser gvidas kurson en fundamenta lernejo, kie li instruas; 25.10.1990 Jarmila Pastrňáková rakontis pri sia libertempo en Meksikio, pri la duoninsulo Jukatano kun multaj vestiĝoj (restaĵoj de malaperinta civilizacio), precipe tempoj kaj piramidoj de Majaoj (belaj diapozitivoj); la prezidanto aldonis diapozitivojn pri Moskvo kaj en novembro li daŭrigis per diapozitivoj pri Maĥaĉkala kaj Jaroslavl; en decembro okaze de naskiĝtago de Zamenhof s-ano Vlado Sládeček el Ostrava priskribis per diapozitivoj kaj magnetofonaj kantoj siajn vizitojn de esperantistoj en Hof, Lančov, Dudince, Poprad, monto Ĉantorio; 17.1.1991 okazis jarkunveno, kiu aprobis la nunajn funkciulojn sur iliaj postenoj - partoprenis ankaŭ D.Kořvara el Ostrava kaj fondinto de la klubo Oldřich Schwetter, ekspedagogo, kies agadon en la kvindekaj jaroj haltigis totalismaj praktikoj de tiamaj oficistoj.

Brno: la klubo trovis rifuĝejon en Spojklub (Šilingrovo nám., proksime de Želný trh). Ĉiumarde ekde 17 h kurso por komencantoj, poste por progresintoj kaj ekde 19.30 h klubaj programoj. Okazis ekz. prelegoj kun diapozitivoj pri Japanio, Novzelando, Norvegio, anglalingva prelego de usona profesoro Andrew Willson pri spiritaĵoj kaj religiaj premisoj por unuiĝo de la homara komunumo. Nuntempe la klubo luktas kun problemoj, kien loki la unikan bibliotekon (2000 volumoj), ĉar ĝis la fino de februaro ĝi devas forlasi la nunan lokon en iama kulturdomo.

Ostrava: la 4-an de februaro 1991 ĝisvivis la 75-an jaron konata esperantisto Ing. Karel Janouš. Li fariĝis ano de Esperanto-klubo en Ostrava jam en la jaro 1936. En 1937 li frekventis originalan Ĉe-metodan kurson de estona lektoro Henriko Seppik. Post la milito li partoprenis seninterrompe Esperantan vivon en la regiono Ostrava. Li gvidis kursojn, instruis en SET Lančov, prelegis, organizis famajn renkontiĝojn sur la monto Ĉantorio, lektoris korespondajn kursojn, en la periodo 1982-1987 li estis estrarano de la Centra Komitato de ĈEA. Li estas senĉese aktiva membro de Esperanta klubo Ostrava-Vitkovice. Akceptu koran gratulon de nia Esperanta familio.

90 jaroj de Esperanto-klubo en Brno
En junio 1991 festos la Esperanto-klubo en Brno sian 90-jariĝon. Ĝi estis la unua Esperanto-societo en la iama Aŭstrio-Hungario, tial ni supozas ankaŭ eksterlandajn gastojn. Interesitoj petu pluajn informojn je adreso: Esperantista klubo, poŝtkesto 154, 657 54 BRNO 2.

Antonimo estas vorto rekte kontraŭsignifa al la alia, en Esperanto precipe la mal-vortoj: bela - malbela. Sed ne ĉiuj antonimoj estas formataj per la prefikso mal-: tago-nokto, blanka-nigra, kuri-stari, k.s. Ankaŭ apud multaj mal-vortoj staras en la moderna Esperanto radikvortoj, kies signifo estas kutime pli forta: "trista" estas pli funebra ol "malgaja", "mava" estas pli senmorala ol "malbona", "frida" impresas pli glacie ol "malvarma" ktp. Ni prezentas al la leganto kelkajn antonimajn duopojn el PIV, ĉar antonimeco bonege apogas la memoron.

bona	dobry	mava	zlý, špatný
sano	zdraví	morbo	choroba
granda	velký	eta	malý, drobný
kolosa	ohromný	pita	mrňavý
giganta	gigantický	nana	trpasličí, zakrslý
ciklopa, titana	obrovský	liliputa	liliputánský
mamuta	mamutí	kolibra	kolibří
larĝa	široký	streta	úzký
longa	dlouhý	kurta	krátký
alta	vysoký	basa	nizký
lontana	daleký	proksima	blízky
supra	horní	infra	dolní
liva	levý	dekstra	pravý
dika	tlustý	minca	tenký
grasa	tučný	magra	hubený, jalový
obeza	tlustý	gracila	vychrtlý, hubený
korpulentia	tělnatý	svelta	štíhlý
dura	tvrdý	mola	měkký
aspra, raspa	drsňý, hrbolatý	glata	hladký
forta	silný	febla	slabý
fortika	pevný	fragila	křehký
rigida	tuhý, strnulý	supla	poddajný, ohebný
striкта	těsný	loza	volný
bela	krásný	turpa	škaradý
superba	nádherný	hida	ohyzdný
gracia	působný	plumpa	nevábny
linda	hezky	aĉa	nepěkný
pimpa	přitažlivý	naŭza	odpudivý
ŝika	módně elegantní	puca	nařintěný
parfuma	vonný	fetora	smrdutý
aroma	voňavý	stinka	smradlavý
hela	světly	obscura	tmavý
lumo	světlo	tenebro	tma
varma	teplý	frida	studený
friska	vlahý	tepida	vlažný
humida	vlhký	seka	suchý
plena	plný	vaka	prázdný
preciza	přesný	ŝvaga	nepřesný
ĝoja	radostný	morna	tišný
gaja	veselý	trista	smutný
serena	jasný, nezkalený	sombra	zasmušilý
joviala	veselý (povahou)	moroza	nevrlý
frivola	lehkomyslný	aŭstera	mravně přísný
kuraĝa	odvážný	timema	bázlivý
brava	hrdině statečný	kovarda	zbaběle krutý
heroo	hrdina	poltrono	zbabělec
temerara	amělý	timida	plachý

afabla	laskavý	bruska	příkrý
tenera	něžný	groba	hrubiánský
galanta	galantní	insolenta	nestoudný, drzý
deca	slušný	triviala	sprostý
pruda	stydlivý	lasciva	necudný, chlípny
sobra	střízlivý	ebria	opilý
laŭta	hlasitý	softa	tichý
pura	čistý	sordida	špinavý
frua	časný	tarda	pozdní
juna	mladý	olda	starý
dokta	učený	senklara	nevzdělaný
probabla	pravděpodobný	nekredebla	neuvěřitelný
rapida	rychlý	lanta	pomalý
diligenta	pilný	pigra	líný
vigili	bdít	dormi	spát
ascendi	stoupat	descendi	klesat
multe	mnoho	poke	málo
eksplici	objasnit	konfuzi	zmást
avari, harpagoni	lakotit	prodigi	rozdávat, rozhazovat
hamstri	škudlit	disipi	promarnit
aperti	otevřít	fermi	zavřít

Plejparto de ĉi tiuj vortoj troveblas ankaŭ en la poŝvortaro de Hromada, tamen ili estas malmulte konataj, ĉar la lernolibroj proponas nur inter unu kaj tri mil vortradikojn. Plena Ilustrita Vortaro enhavas pli ol 15000 vortradikojn, do la pli granda parto de la Esperanto-leksiko ne estas en la esperantistaro ankoraŭ digestita kaj plene hejmiĝinta. Novaj neologismoj provokas ĉiam grandan ondon da protestoj, kaj prave, ĉar ne estas saĝe senbride ampleksi la vortprovizon, se el la jam ekzistanta stoko da vortoj estas ĝenerale konata apenaŭ kvinono. Ni volas prezentadi al niaj legantoj tiujn esprimojn, kiuj ne plu estas novismoj, sed kiuj ankoraŭ ne apartenas al la kutima vortaro de ordinara esperantisto.

Miroslav Malovec

Novaj planlingvoj

Preskaŭ ĉiujare aperas novaj planlingvoj, kies aŭtoroj asertas, ke ilia verko estas pli perfekta ol Esperanto - ili ne komprenas, ke la lingvon perfektigas stilistika, frazeologia kaj terminologia tralaboro, ne ŝanĝo de la gramatiko. En lastaj jaroj trakuris nian gazetaron informoj pri la francaj projektoj ADLI kaj UROPI, nun aperas ankaŭ germana provo UNITARIO. Ĝi kombinas Esperanton kun Interlingua. Ĝia aŭtoro, Mario Pleyer, en la unua libro "Per medio de picturoyn" prezentas sur 126 paĝoj interesan metodon doni imagon pri la gramatiko de nova lingvo surbaze de bildoj. Dua libro, 200-paĝa kaj germanlingva, detale priskribas fonetikon, ortografikon, vortformadon, principojn por elekti vorton kompare al vivantaj lingvoj, interese parolas pri problemoj de lerniloj, pri organizado de movado, pri terminologia ŝlosilo de WUster kaj prezentas valoran bibliografion pri interlingvistiko. Kiu volas diskuti kun la aŭtoro, aŭ ricevi informojn, skribu al adreso: Mario Pleyer, Bergstrasse, D-6140 Bensheim, Deutschland.

- 1e, mm-

.....

okazis en la jaro 1990 en latvia urbo JELGAVA kaj partoprenis ĝin 435 kongresanoj, ankaŭ el Brazilo, Britujo, Finnlando, Norvegio, Pollando, Hungario, ktp. El Ĉeĥoslovakio ĉeestis s-ano František Domkar el Havlíčkův Brod. La ĉeftemo de la kongreso estis "Rolo de Esperanto en protekto de lingva kaj kultura diverseco de malmultnombraj nacioj". Fine de la kongreso la partoprenantoj sendis alvokon al la registaroj de la tri baltaĵ ŝtatoj atentigante pri la utileco de Esperanto. En 1991 okazos la kongreso en Estonio. Interesitoj skribu al s-ro: Valdis Gulbis, 229590 TALSU RAJ, Libagi "Andumos", LATVIO, U.S.S.R.

estas informa bulteno, kies eldonado estas planata ekde 1991 por helpi al esperantistoj krei E-familion. Informon petu ĉe Geesperantista Servo Geedziga, poŝtkesto 175, SU-220050 MINSK.

(PEM) estas asocio fondita en 1980 en Provo, Usono, ŝtato Utaho, kiel neprofitcela anonima societo, kiu celas disvastigi Esperanton inter mormonoj kaj diskonigi la restaŭritan Evangelion de Jesuo Kristo inter esperantistoj. Senpaga provexemplero de la revuo "Esperanta Mormonaro" estas havebla ĉe la redakcio je la adreso: Por-Esperanta Mormonaro, rue Hautes Collines 28, BEAUFAYS, B-4950, Belgio

kaj projektas londi Esperantistan Genealogian kaj Heraldikan Federacion, kies celo estos informi pri genealogio, pri uzebleco de la internacia lingvo por genealogoj kaj iliaj esploroj. Oni planas eldonadi en Esperanto genealogian bultenon kaj fakliteraturon kaj organizi seminariojn. Pluajn informojn donas:

s-ro Charles M. Hall, P.O.Box 21346, SALT LAKE CITY, Utah 84 121.
s-rino Ilona György, Szechenyi ut. 18, 2230 GYÖMRŐ, Hungario, au
s-ro Edward Wojtekowski, Box 312, 50-950 WROCLAW 2, Pollando.

(SEG) estas organizata de Vroclava Esperanto-Klubo por vizitantoj de Vroclavo (Wrocław) kaj por admirantoj de ĝiaj mezepokaj monumentoj. Oni eldonas regule adresliston de sileziaj esperantistoj, kiuj kontraŭ modesta pago disponigas siajn loĝejojn al eksterlandaj esperantistoj. Pliajn informojn donas: Vroclava Esperanto-Klubo, poŝtkodo 16, str.Dubois 3, 50-952, WROCLAW 17, Pollando.

okazos en Olomouc, Ĉeĥoslovakio, en la tagoj 1991-05-11/17. La urbo Olomouc situas 100 km nord-oriente de Brno, kie la kongreso estis planata, sed necesis transloki ĝin pro internacia fiaro, kiu okupis ĉiujn hotelojn en Brno. Krom laboraj kunsidoj estas preparataj ankaŭ kulturaj programoj (baloj, folkloraj vesperoj), ekskursoj al proksimaj urboj, ekumenaj diservoj, gazetaraj konferencoj ktp. Aliĝilojn kaj informojn petu ĉe:

[illegible]

(ILEI) celas helpi instruistojn ĉie en la mondo instrui la Internacian Lingvon aŭ uzi ĝin por interŝanĝi profesiajn spertojn. Ĝiaj anoj ne bezonas instrui. Kontaktoj inter anoj okazas pere de la Internacia Pedagogia Revuo, pere de seminarioj kaj ĉiujaraj kongresoj. Kaptu bonan okazon kaj aniĝu al ILEI kaj aliĝu al la venonta 25-a Konferenco de ILEI, kiu okazos en Voss, Norvegio, tuj post la Universala Kongreso. Aniĝu aŭ petu pliajn informojn je la adreso de la kasiisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio.

(Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) okazos en la tagoj 1991-08-03/08 en la norvega urbo Voss. Kadre de la konferenco okazos ankaŭ Cseh-seminario. Aliĝiloj kaj pliaj informoj ĉe: Malcolm Jones, 41, Causeway, CHIPPENHAM, Wiltshire SN15 3DD, Britio.

- Koopera Instituto pri Moderna Edukado - por esperantistaj edukistoj (Freinet-pedagogio) okazos en la tagoj 1991-07-12/22 en SMARVES, 8 km sude de Poitiers (Francio). Interesuloj turnu al: -pro Paul POISSON. 239 Rue Victor Hugo, F- 37540 St.Cyr sur Loir.

- antaŭ ne longe naskigita - serĉas kontaktojn kun similaj organizaĵoj en eksterlando. Ĝi eldonas la gazeton LATVIA ESPERANTISTO, en kiu aperis recenzo pri "Liriko intima" de Jana Čichová. Interesuloj skribu je la adreso: s-ino Saulcerite Neilande, SU-226014 RIGA-I4, Latvio.

- BEL, pri la Bahaa Religio, kunlabore kun la Fondumo Zamenhof, okazos en Bialistoko, Pollando, 1991 majo 22/26. Aliĝoj ĉe: s-ro Bernhard Westerhoff, Ulrichstr. 20, D-6000 Frankfurt 50, Germanio.

BRAZILAJ SPIRITISTOJ KONSTRUAS HOSPITALON kaj ESPERANTO-LERNEJON
la spiritisma komunumo de la regiono de Sao José do Rio Preto,
stato San-Paulo, pere de Bonfara Spiritisma Societo, kiu agadas
ĉe la fakoj de sano, edukado, socia promocio kaj instruado de la
Lingvo Internacia - Esperanto, konstruas Spiritisman Regionan
Hospitalon kaj Spiritisman Edukadan Instituton, kiuj antaŭ ĉio
helpos al la plej malriĉaj homoj en la regiono. Tial estas petata
helpo de simpatianoj de ĉi tiu ideo. Donacojn oni povas sendi al:
SEB - Sociedade Espirita de Beneficencia, Av. Octávio Luiz De
Marchi 333, Caixa Postal 126, 15.035-Sao José do Rio Preto - SP,
Brazilo.

en la Ercmontaro okazos ĉijare en la ĉeĥa urbo Pernink, versajne dum 1991-09-28/27. Kiu amas vagi tra arbaroj en ne tro alta montaro kaj Esperantlingve babili, skribu al adreso: Ing. Miloš Bloudek, Vyšehradská 4, 360 01 Karlovy Vary, ĈSFR.

POSTKONGRESO DE IFEF EN ŽILINA

Por la tagoj 1991-05-18/25, do tuj post la 43-a IFEF-kongreso en Olomouc, invitas la kongresanojn la slovaka urbo Žilina. al post-kongreso, en kies programo estas ekskurso al Altaĵ Tatroj, vizito de la hotelo "Esperanto" en Pribylina, de la Orava-kastelo, de subĝiela muzeo, veturado per etspura historia vaporfervojo k.s. Aligiloj kaj informoj: Ing. Magdalena Feifichová, TOM 25/5, 010 01 Žilina, Ĉeĥoslovakio.

INSTITUTO DE MONDAMISMAJ STUDOJ

La Instituto de Mondamismaj Studoj serĉas por sia 13-a Sesio (1991-07-20/28) 3 au 4 prelegantojn de universitata nivelo, kapablaj prelegi en Esperanto dum c. 1 h. 30 kaj debati kun multlingva publiko (parte esperantista). La sesio okazas en la kastelo "La Lambertie" en Pineuil/Sainte-Foy la Grande (Gironde, inter Bergerac kaj Libourne, Francio). La prelegantoj ne estos honorarigitaj; ili venas pro sia persona engagigo. Iliaj vojaĝ-kostoj povas esti rezepitaj; ilia gastigado kaj nutrado estos senpagaj. La temoj proponataj: Eŭropo de la kulturoj - Eŭropo de la popoloj - Eŭropo ekonomia - Eŭropo kaj sindikatoj - La Homaj Rajtoj en Orienta Eŭropo dĝpost la falo de la komunismaj regimoj - La "Neregistarej Organizaĵoj" kaj la asocia vivo en Eŭropo - De Eŭropo dividita al du blokoj ĝis la futura Eŭropa federacio - La novaj kandidatoj al la Eŭropa Ekonomia Komunitato - Eŭropo kaj ĝia rolo en la monda disvolvigo - Eŭropo rigardita el la aliaj kontinentoj. Viajn leterojn adresu al la sekretario: F-ino Isabella Hannequart, 65, rue du Commerce, F 37000 TOURS, Francio.

KULTURDOMO DE FRANCLANDAJ ESPERANTISTOJ

estas kooperativa societo fondita en 1951. Ĝi posedas la bienon "Grésillon" kun kastelo kaj 18-hektara parko. Ĉiujare ĝi gastigas kursojn, prelegojn, distraĵojn kaj ekskursojn disponigante kurso-kambron, rican bibliotekon, salonojn, butikon kaj sportteronon. Por 1991 ĝi proponas jenajn arangojn: 1) Praktika formado de Esperanto-instruantoj kaj internacia renkonto de infanoj (24.4.-4-5.1991); 2) Internacia amika renkonto (17.6.-30.6.); 3) Seminario por Cseh-instruado (1.7.-8.7.); 4) La historio de Eŭropo tra la verkoj de Baghy kaj Kalocsay (9.7.-22.7.); 5) La arto traduki (23.7.-5.8.); 6) Lernu kaj praktiku (6.8.-19.8.); 7) Somerfina lernejo (20.8.-2.9.). Adreso: Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, Kastelo Grésillon, 49150 Baugé, Francio.

JAPANINO EN ĈEĤOSLOVAKIO - prelegvojaĝo en 1992

S-ino Kimie Markarian, japanino vivanta en Britio, intencas entrepreni en 1992 prelegvojaĝon tra Ĉeĥoslovakio. Redakcio de Starto alvokas Esperanto-klubojn, kiuj deziras sin gastigi kaj aŭskulti, ke ili sendu al ni inviton, por ke si povu arangi sian programon. Si mem skribas: "Mia celo estas ... esti utila al nia movado en via lando. Tio signifas, ke mi certe atendas, ke la organizanto sendu min en ordinaraĵajn lernejojn. Ne nur al E-grupoj. Mi estis en Hungario (junio 90) kaj prelegis en 13 lernejoj en Budapeŝto. Multaj NEesperantistaj instruistoj aŭdis min kune kun lernantoj. Kaj ili devas aŭdi tradukiston. Certe ili rimarkis, ke E-o funkcias. Cetere via lando organizas la UK 1992? Do, ĉi povas arangi ion antaŭ tiam, certe estas bona informado. Ĉu vi ne pensas? ... Ĉu via landa asocio povus gastigi min, mi kompreneble donacos 30-50 scrobanojn, kiujn la Asocio povus vendi." Adresu viajn invitojn al la redakcio de Starto.

LA JARO DE TRANSITIVECO

Ĉar jam de longe estas enradikiĝinta en la mondo kutimo dediĉi tutan jaron da agado al specifa temo, mi proponas, ke en Esperanto la pasinta jaro 1990 estu deklarita La Jaro de Transitiveco.

Per mia artikolo "Neinstruebla, nelernebla gramatikajo? La transitiveco de verboj en Esperanto" (Esperanto, novembro 1988, pg. 188-189) mi startigis ĉenon da opini-esprimoj de legantoj. Tiu diskutado daŭris tutan jaron, ĝis la lasta komento aperis en la numero de marto 1990. Surbaze de la reagoj al mia ĉi-supre citita artikolo kaj ankoraŭ al aliaj pri la sama temo, kiuj estis publikigitaj en antaŭaj jaroj, mi tiris la konkludon, ke interesiĝo ne mankas inter membroj de la Esperanta lingvokomunumo, kaj pro tio ĝi estas utile, se necese, entrepreni pli profundan analizon de tiu ĉi malfacila aspekto de la gramatiko de Esperanto.

Pravigas mian elekton de 1990 kiel La Jaro de Transitiveco du eventoj. Unu estas seminario pri instruado, okazinta la 22-an kaj 23-an de aprilo sub auspicioj de la Nederlanda Grupo de Geinstruistoj pri Esperanto kaj la Nederlanda Esperanto-Asocio. Unu el la specifaj celoj estis klarigo de specialaj eroj en la lingvo, kiuj ĝenerale nomigas "malfacilaj"; inter ili estas la uzo de "igi" kaj "igi". La dua programo, kiu okazis la 24-an kaj 25-an de februaro en Budapeŝto, estis la 5-a Pedagogia Konferenco por instruantoj de Esperanto. Ĝia ĉeftemo estis la transitiveco de verboj. La referaĵoj pri transitiveco traktis la temon precipe laŭ la vidpunkto de praktika instruado, do estis klarigitaj la klasifiko de verboj en Esperanto kaj la reguloj por la uzo de la sufiksoj "-ig" kaj "-ig".

Mia kontribuaĵo, titolita "Komplika transitiveco en Esperanto kaj simpligita transitiveco en Ido", celis prezenti la problemon rilate transitivecon en larga perspektivo. Jen en tre konciza formo la esencaj punktoj.

1. Eraroj en la uzo da Esperanto estas klasifeblaj kiel (a) eternaj kaj (b) universaliaj. Ambau trajtoj karakterizas la misuzon de transitivaj kaj netransitivaj verboj.
2. Kauzoj de la malfacilaĵo povas esti (a) nekapablaj lernantoj, (b) nekompetentaj instruantoj, (c) manka, neadekvata aŭ konfuza traktado de tiu gramatikajo en lerniloj kaj konsultlibroj, kaj (ĉ) difektoj en la lingvo mem (Esperanto estas facila lingvo kun kelkaj malfacilaj gramatikajoj).
3. Proponoj por elimini eraran lingvouzon limigas al jenaj kvar.
 - a. Reziĝnacio. Oni akceptas la malfacilecon kaj rekomendas pli profundan kaj intensan studadon por bone lerni la lingvon.
 - b. Teoriumado. Oni povas faciligi komprenon de la problemoj per ellaborado de komplikaj, "akademiaj" analizoj de transitiveco kaj novaj klasifoj en verboj kaj komplementoj. Tiaj teorioj ne estas facile aplikeblaj por pedagogiaj celoj.
 - c. Tolero de eraroj. Oni konstatas, ke subnorma lingvouzo fakte ekzistas. La elita lingvo estas uzata de kleruloj kiel literaturistoj kaj gramatikistoj, dum ĝia kontraŭo, la demotika lingvo, apartenas al la ordinaruloj.
 - ĉ. Reekzamenado kaj, eventuale, simpligo de la gramatiko de Esperanto celas eviti la kontraston inter la elita kaj demotika lingvoj. Por forigi malfacilaĵojn oni proponas: (a) reenkondukon de la kategorio "x" por signi samajn verbojn uzeblajn transitive kaj netransitive; (b) adopton de la reguloj por la uzado de verboj formulitaj en la planlingvo Ido.

Bernard Golden

Ĉu liriko vere intima ?

Jana CíCHOVÁ: Liriko intima * * * Formato 15 x 20, paĝoj 18, aldono al la revuo Progreso, Brno 1999, ilustris J. Schäfer

Enkonduke akcentas la kompilinto R. Vlková, ke la poezio de J. CíCHOVÁ ne estas enhave unuflanka kaj monotona, ĝi respeguligas diversecon de animstato, diverskoloron de la aŭtoro. Krom poemoj de Jana CíCHOVÁ ni trovas en la broŝuro poemojn de Miloš Lukáš kaj Ludmila Jevsejeva. Tiuj du poetoj ebligas al ni kompari nivelon de tri poetoj. Miloš Lukáš, kiel konate, verkis poemon enhave koncentritan, lingve precizan, strekis ĉion nenececan, akcesoran (La dio Vanataat al si alvokis / en la ĉielon la grizbarban majstron / por povi lian arton ĝui daŭre), ni sentas, ke la poeto ŝparas per vortoj, minimumigas ilin por diri, kion li diri volas. L. Jevsejeva en sia poemo "Mi turnas mian lornon al Prago" vidas tie allogan duopon (Eli kaj Jana / vastec' oceana, tipiga abismo de l' sentoj / sur kies fundo / en vera abundo / sin kaŝas mimozoj, serpentoj), la lingvo iras glate, diras malmulton, sed kion ĝi diras, tion ĝi scias diri. Jana CíCHOVÁ en la poemo "Lacerto" ludas kun vortoj (LACERTO - jen la certo), komencas vere liriki (Solas mi en mia ĉambro - / en trankvil' / kaj subite rampas el la kvar anguloj / lacertoj). En la poemeto "Kulpigo" estas versoj verkitaj en tono vere lirika, kiu laŭ mi plej oportunas al Jana CíCHOVÁ (Mord-vundite mian lipon flame / pense estas vi ĉe la Alia / ... ame apartenas ne al mi - la flamo via). Enhave kaptas la poetino problemon intiman, lingve la versoj tinte sonas. Tiajn versojn mi trovis ankaŭ en la poemo "Kakto" (Ĉe la kakto havas ĉarmon / sentigante sian dornon / se homaĉa mano tuŝas / ĝian belon. Ĝi forpuŝas / scivoleman atakanton / ĵete pretigante ganton). Se mi legas la version "Nu, adiaŭ - kaj pordeto fruktĝardena..." plaĉas al mi la senta akcento kaj demando. Ankaŭ se Jana demandas "Ĉu gitar' de iluzi' rompiĝos" aŭ "Ĉu la Sorto rozojn aŭ nur dornon / ... kaŝis". Tono de certa tristo eksonas el la versoj "Nur la ŝtrato vin satigis / kiam junis vi kaj logis / ... per velkintaj mamoj ne varmigos / stratulino la marmoron". Oni povas nur bedaŭri, ke la tuta libro ne enhavas tiaĵojn. Se la kompilinto akcentas, ke la poezio de Jana respegulas diversecon de animstato, ŝi proponas por la poetino la programon por la futuro. Mi riproĉas al Jana, ke ŝia uzo de rimoj ne tro originas, rimante en la tuta libro (Ĉarmaj - belaj, aserto - certo - lacerto, flame - ame, unutage - santage, frostiga - vundiga, saltas - haltas), do ĉiam la saman kategorion de la vortoj; ŝi ne povas tiel atingi majstrecon, kiun ŝi devus lerni ĉe Boulton aŭ Auld. Agrabla libreto, sed ne tro profunda intima liriko.

Jiří Karen

Jana CíCHOVÁ: Kvar sezonoj * * * Propra eldono, formato 15 x 20, paĝoj 16, ilustrita, Brno 1990, prezo ne indikita

Enkadre de kvar sezonoj strukturis sian poezion J. CíCHOVÁ. Pri la enhavo elokventas jam titoloj de la poemoj: Steloj movigas monton, Amo, Floroj, Lidice (rozoj sub la martirkruco), Ĉiam Lidice, La infano el Lidice, Naturbildo, Fine de l'somero, Li, Lekanto kaj burdo, Melodioj aŭtunaj 1 - 5, Venis la Kristnasko, Egaleco, Vivo kaj morto, Rememoro, Vojkruciĝo, Pomarbo kaj betulo. La aŭtorino meditas pri la naturo, amo kaj pri la fato de la vilaĝo Lidice, kiun detruis dum la dua mondmilito nazioj. La poemoj estas verkitaj facilmane kaj priskribe, mankas pli profunda prilaboro formala kaj enhava. Plej efikas la versoj bazitaj sur rim- kaj tonmuziko (Amo-buŝo, lipoj diras: ni pri kiso ĝemsopiras, pri la rido, belo, bono, pri ekstazoj kaj la kono; aŭ: Ni venis tien ĉi jam foje, kiam arboj estis senfoliaj, kiam akra vento vangojn pinĉis, kiam nuboj kuris surĉiele). Uzi asonancojn pli kvalitas ol uzi rimojn laŭ modelo: anoncas sin - vizitas min, haltigis - mortigis, mia - via, floran - naturon. Poeto vera bezonas serĉi rimojn pli originalajn, kion scias la aŭtorino ankaŭ en kazoj por rimi: al trankvil' - pensoj mil. Mi akcentas: bona poeto uzas ĝue rimojn de diferencaj vortkategorioj (substantivo kun verbo ktp.), kaj se tio ne eblas, li uzas asonancojn. Tiel li evitas monotonan rimordon. Se poeto uzas la liberan versformon, li devas densigi, do helpe de minimumo da vortoj esprimi maksimumon da enhavo, da sentoj, imagoj ktp. Do, la poezio de Jana CíCHOVÁ estas karakterizebla surbaze de ŝia propra muzo: "Kun paletro en la man' / skizis mi impres-abundon".

-LE-


INTERNACIAJ SEMAJNOJ DE ESPERANTO

Pro niaj pasintjaraj sukcesoj ni organizos somere du internaciajn semajnojn:

- la 15-a semajno okazos en vilaĝeto de la francaj Alpoj, 1000 m super marnivelo, 30 km sudoriente de Ĝenovo, en mirinda ripoza loko, kadre de bela feriejo, de la 24-a ĝis la 31-a de aŭgusto 1991;
 - la 16-a semajno okazos ĉe mediteranea marbordo, en havenurbo Sete, 30 km okcidente de Montpellier, en bela parko apud la maro, de la 7-a ĝis la 14-a de septembro 1991.
- Ni proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto. Ni havas tri nivelajn kursojn zorgitajn de eminentaj instruistoj, inter kiuj s-roj Morians, Babin kaj sinjorino C. de Lorenzi. Vi povas kapti la okazon ferii tri semajnojn en Francio, la dua semajno estos libera: tiel vi povos vojaĝi tra Francio kaj viziti viajn korespondantojn aŭ, laŭ la prefero, vi povos plurestadi en la montara feriejo. Kiel ĉiujare vi trovos vere internacian etoson. Ankaŭ ... banado, ekskursoj, belaj vesperkunvenoj kaj bona manĝo ĝojigos vin. Tre modesta restadkosto; ambaŭ domoj taŭgas por rulseĝoj. Ebleco tendumi proksime. Aliĝo/informo:
- **** Esperanto, 5 rue du Docteur Roux, 34000 Montpellier, FRANCIO

??

Krucenigmo



Horizontale:

A * speco de ŝtraŭbrelo * mallongigo de basbaritono * B * la unua parto de la kaŝfrazo * C * dancistino de baletto * D * sinforges' * ronĝi * E * aŭtosimbolo de Indonezio * muzika teatraĵo kun kantoj * lirika poem' * F * koncept' * tre ŝati * flugilo * G * pensiigi * H * arabaj barkoj * alkohola trinkaĵo * I * mallongigo de Unuiĝintaj Nacioj * sek' de ordono * femal' * J * la dua parto de la kaŝfrazo * K * enlasejo *

Vertikale:

1 * alezi, trui * marsablaĵ' * 2 * samcelane * 3 * prepari ĉevalon por rajddado * inklino * interjekcio de doloro * 4 * aroma legomo * sufikso montranta lokon * prepozicio * 5 * indiko de folioforma telegramo * duop' * persona nedifinita pronomo * 6 * hinda aerokompanio (Air India) * tendenci * malhelp', obstakl' * 7 * radiostacio de Burmio * ceremoni' * literatura form' * 8 * kenopodio (kreskaĵo) * "4" per romaj ciferoj * finiĝo de pluralo de Esperantaj substantivoj * 9 * terceto * fari * "r" en Esperanta alfabeto * 10 * onduma linio * 11 * sufikso de zoologia aŭ botanika taksono * fragment' *

Helpilo: * botro * BBS * BBT * Daoj * ELT * Omit' * RI * SAE *

Ing. Ĉestmír Vidman

(Kaŝfrazo estas sur la antaŭlasta paĝo)

Korespondi deziras:

Pollando

* Agnieszka Sygula, 32-045 SULOŠZOVA I 19, woj.m. Kraków, 14-jara komencantino * Mirosław Zawadzki, 80-398 GDAŃSK - OLIWA, s.Obr.Wybrzeża 4c/85, 22-jara fraŭlo, komencanto * Krzysztof Doberaszyn, 62-110 DAMASŁAWEK, Grundwaldska 15, 26-jara studento de Agrokultura Akademio, povas korespondi ankaŭ ruse, germane kaj angle * Marta Szczawinska, ul. Sandomierska 48, 37-300 LEŻAJSK, Grzegorz Wienc, 62-005 OWIŃSKA, str. Poprzeczna 14c/13, 33-jara kolektanto de insignoj * Czesław Kuvek, ul. Tuwima 5/110, 39-200 TARNÓW, 30-jara komencanto * Andrzej Szwanke, ul. Orzechowa 50/13, 50-540 WROCLAW, 31-jara soldato kolektanta monerojn, pri interlingvistiko * Halina Pacwa, skv.Poczt. 422, 00-950 WARSZAWA, biologino *

Sovetunio

* Leo Teder, Nõmme sovhoos, 203622 KILINGI-NÕMME, Estonio, kolektanto de bildokartoj, poŝtmarkoj kaj kalendaretoj * Palmira Milisauskaiti, 235250 PASVALYS, Vysniesz 28 - 48, Litovio * Tatjana Ananjev, Vålja 4-16, 203521 MÄRJAMAA, Estonio * Lea kaj Ivo SULB (12-jaraj), 202350 JOGEVA, aia 11-3, Estonio * Anne Sulb 202350 JOGEVA, aia 11-3, Estonio, instruistino * Tanja Baŝkirova, Ciolkovski 16-76, Ŝostka, Sumŝka, 245110 Ukrainio, 23-jara komencantino * Viktor Kudrjavcev, ab.k.67, 620077 SVERDLOVSK, petas sendi adresojn de junaj korespondemuloj por lernantoj de Esperanto * Borzova Olga, 123585 MOSKVO, ul. gen. Glagoleva, d. 30, k.l. kv.29, 27-jara komencantino * Žukova Nataŝa, 326610 GENIČESK, Herson regiono, str. 8.marta 45, 15-jara lernantino * 12 - 16-jaraj estonaj gelernantoj dez. korespondi pri diversaj temoj: Märijamaa Keskkool, 203521 MÄRJAMAA * 44. keskkool Esperanto-klasioj, 200029 TALLINN * Kose keskkool, 203040 KOSE * Pärnumaa, Kergu 9 kl. kool, 203469 KAISMA *

Germanio

* Rica Drechsel, Am. Sportplatz 6, 0-8701 GROSHENNERSDORF *

Brazilo

* s-ro Pekim Vaz, caixa postal 3250, 69 001 MANAUS - AM, 33-jara geologiisto, volas interŝanĝi kasedojn kun folkrora muziko, librojn, poŝtkartojn *

Italio

* d-ro Enzo Garzotto, Via R. Arnaldi 15, 36016 THIENE (VI) * * d-ro Benzo Bille, Via Capri 32, 36015 SCHIO (VI) * * Gian Maria Lanaro, Via Monte Cengio, 36030 SAN VITO DI LEGUZZANO (IV) * Pierluigi Macorig, Via Schio 64, 36036 TORREBELVICINO (VI) * Adriano Magnabosco, Via San Giorgio, 36015 SCHIO (VI) * Mario Brentonico, Via Alticchiero 14, 36015 SCHIO (VI) * s-ino Cecilia Fochesato, Via Proa 48, 36034 MALO (VI) *

Ĉeĥoslovakio

* Lenka Pacáková, 549 34 HRONOV IV, č. 187, 18-jara komencantino * Vladimír Rotrekl, Dobšice 297, 669 02 ZNOJMO * Beata Lukoszová, ul. Na kopci 2108, 734 01 KARVINÁ - MIZEROV, 18-jara studentino *

Kaŝfrazo de la krucenigmo: Ĉen labore ne venas vivo

Český esperantský svaz 110 01 PRAHA 1, Jilská 10

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská 10, CS - 110 01 Prago 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Respondeca redaktoro: Miroslav Malovec, administratoro: Karel Daněk, STARTO, poŝtfako 425, CS- 660 25 BRNO 2, Ĉeĥoslovakio. Abonebla ĉe niaj perantoj, ĉe UEA aŭ rekte ĉe nia asocio.

Nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha. Vychází 6 x ročně. Odpovědný redaktor: Miroslav Malovec, administrátor: Karel Daněk, STARTO, pošt. příhrádka 425, 660 25 Brno 2.

NOVINOVÉ DOPLATNÉ

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
j.zn. P/1-1267/79 ze dne 6.4.1979